

# BELGA ESPERANTISTO

49a Jaro — N-ro 1a — Januaro 1957a

Fondita  
en 1908a



Abonprezo:  
Fr. 100,-

Redaktoro-Administranto:  
la Prezidanto de R.B.L.E.:

**Maur. JAUMOTTE**  
Avenuo De Bruyn, 44  
Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

**REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA**

Asocio sen profita celo,

aliĝanta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

## REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA

kaj ĝia organo

### „BELGA ESPERANTISTO“

*prezentas siajn plej korajn bondezi-  
rojn por la nova jaro*

## E.K.I.-Zamenhoftagoj en nia Lando

Okaze de la Zamenhoftago, okazis  
en diversaj belgaj urboj E.K.I.-vespe-  
roj, kiuj ĉiuj bonege sukcesis:

### Antverpeno

La 7an de decembro, pli ol 130 sa-  
mideanoj kunvenis en „Witte Leeuw”,  
por la ĉiujara festo. La Prezidanto  
S-ro M. Jaumotte enkondukis la pro-  
gramon per solena parolado pri la

Majstro. Li pritraktis la tiel emocii-  
gan unuan publikan paroladon de D-  
ro Zamenhof, dum la 1a Universala  
Kongreso en Boulogne-sur-Mer.

S-ro Hector Boffejon, administran-  
to de la nova kaj jam bone konata  
revuo „Mondo”, bonvenigis la gajnin-  
tojn de la unua granda konkurso de  
tiu organo kaj disdonis la premiojn,  
— inter kiuj unu de Fr. 50.000,— al la  
feliĉuloj, kiuj estis venintaj el Bruĝo,  
Bruselo kaj la ĉirkaŭaĵo de Antverpe-  
no.

Al la efektivigo de la arta progra-  
mo kunlaboris la Brusela Sekcio de  
La Naturamikoj (Fino R. Oosters,  
G-roj Taulissen, G-roj Van Nerum, S-  
ro G. Vandervondelen) kun tre lertaj  
manpup-teatraĵoj; la Hobokena Sek-  
cio de la sama organizaĵo, reprezen-  
tata de S-ro L. Thys, kiu kantis kaj  
sin mem akompanis; „La Verda Ste-  
lo” per kelkaj kantoj de S-ro K. Ame-  
ryckx, akompanata de la piano de  
Fino Cl. Peeters, kaj per amuza mu-  
zika numero de S-roj W. Van Nere-  
aux kaj Joz. Vinck. Per trafaj vort-  
toj, la prezidanto aplaudigis ĉiujn kaj  
konkludis tiun vere bonege sukcesin-  
tan vesperon.

### Bruselo

La 22an, proksimume 125 esperan-  
tistoj kunvenis en la bela festsalono  
de la „Centra Stacidomo”, por unua  
E.K.I.-vespero.

S-ro R. Jacobs elparolis la bonveni-  
gan vorton; li salutis la multnombrajn  
ĉeestantojn, inter kiuj S-ro M. Jau-  
motte, prezidanto de la antverpena  
E.K.I.

Tiu ĉi, siavice, diris sian ĝojon pro  
la multnombra ĉeesto de tiu ĉi unua  
festoj kaj deziris al la restariĝinta E.  
K.I. plej prosperan vivon.

S-ro De Bruyne montris tiam di-  
versajn filmojn pri kongresoj de la  
esperantistaj Fervojistoj; la „Natura-  
mikoj”, gvidataj de S-ro Van Nerum,  
prezentis, en diversaj vicoj, belegajn

(Sekvo sur paĝo 4)

## La Ora Jubileo de „La Verda Stelo”

### LASTA INFORMO ANTAŬ LA FESTOJ Ŝanĝeto en la horaro

La publikigita programo de la Ju-  
bileaj Festoj de la sabatvespero, an-  
taŭvidis la Inaŭguron de la Ekspo-  
zicia Materialo „Henriette Toussaint”,  
je la 17a horo.

Se oni konsideras ke la ekster-ant-  
verpenaj aliĝintoj al la festoj, ne ĉiuj  
alvenos tre frue kaj nepre deziras u-  
nue iri al sia hotelo, la 17a horo povas  
ŝajni frua. Aliflanke, la dispono pri  
unu horo inter tiu ĉi ceremonio kaj  
la vesperfestoj ne sufiĉas por permesi  
al la verdstelanoj reiri hejmen por  
vespermangi.

Tial la Organiza Komitato decidis  
prokrasti iomete la Inaŭguron de la  
Ekspozicio, ĝis la 18,30a, tiel ke la Ant-  
verpenanoj povos, — se ili tion dezi-  
ras, — ankoraŭ iom frue vespermangi  
hejme; dum la eksterurbanoj povos  
laŭplaĉe iri al sia loĝejo kaj havi man-  
ĝeton en najbara restoracio aŭ kafejo.

La definitiva programo do aspek-  
tas jene:

### Sabaton, la 19an:

Je la 15a horo: Flordemetoj.

Je la 16a horo: Malfermo de la Ak-  
ceptejo.

Je la 18,30a: Bonvenigo. Inaŭguro  
de la Ekspozicio „Henriette Toussaint”.

Tuj poste: Teatra kaj kabareta  
festoj, tuj sekvota de Ballo.

### Dimanĉon, la 20an:

Je la 10a: Jubilea Kunsido kaj ho-  
norigo de la jubileantoj.

Je la 12,30a: Oficiala Akcepto en la  
Urbdomo.

Je la 13,30a: Jubilea Festeno, en sa-  
lonego „Grüter”.

Je la 18a: (ne plu eventuale, sed  
CERTe): Festo en „Witte Leeuw”.

Je la 21a: Disiĝo.

Cu ni nun ankoraŭ substreku la  
fakton, ke la festoj de la ORA JUBI-  
LEO de nia Antverpena Grupo, estos  
okazo por festi ankaŭ solene nian Li-  
gan Prezidanton S-ro M. Maurice JAU-  
MOTTE, pro lia 30jara prezidanteco  
de „La Verda Stelo”, kaj multajn ali-  
ajn veteranojn kaj jubileantojn, kiujn  
ĉiuj belgaj esperantistoj cetere bone  
konas, pro ilia ofta kaj multnombra  
ĉeesto de niaj Kongresoj.

Ni memorigas lastfoje, ke oni an-  
koraŭ povas aliĝi al la festoj, pagan-  
te Fr. 50 (Fr. 25 por la familianoj)  
kaj ankaŭ al la Festeno pagante Fr.  
125, al P.C.K. 726.54 de „La Verda  
Stelo”, Deurne.

Ĉiuj niaj Grupoj estos oficiale repre-  
zentataj. Sed ne sufiĉas ke ĉeestu ofi-  
ciala reprezentanto. Ankaŭ la mem-  
braro trovas nun okazon por montri  
sian simpatian al bonaj amikoj...kaj  
por mem bone amuziĝi en vere sa-  
mideana kaj amika rondo.

Nun, ne plu estas okazo por pro-  
krasto: Aliĝo devas nun esti TUJA!

La O.K.

## KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ

|                                               | gld.  | fr.   |
|-----------------------------------------------|-------|-------|
| La Okuloj de la eterna frato (Zweig)          | 1.35  | 20.—  |
| Infanoj de Betlehem (Lagerlöf)                | 0.60  | 8.50  |
| El la Camera Obscura (Hildebrand)             | 0.75  | 12.—  |
| Ferio kun la morto (Lindquist)                | 2.25  | 34.—  |
| Esperanto por infanoj (Solomon)               | 1.10  | 20.—  |
| Sur sanga tero (Baghy)                        | 4.50  | 70.—  |
| Strato de la fiŝanta kato (Földes)            | 4.50  | 65.—  |
| Bagatelaro (Rosbach)                          | 4.—   | 55.—  |
| La Princo kaj Betty (Wodehouse)               | 1.20  | 15.—  |
| Sveda Poemaro (Carlson)                       | 4.50  | 68.—  |
| El la Manikoj (R. Rossetti)                   | 7.20  | 90.—  |
| Kontralte (Boulton)                           | 7.20  | 90.—  |
| Fundamenta Krestomatio (Zamenhof) nova eldono | 10.50 | 140.— |
| Tartarin de Taraskono (Daudet) tolbindita     | 6.60  | 99.—  |
| Sinjoro Tadeo (Mickiewicz)                    | 6.—   | 80.—  |
| Akbar (Limburg Brouwer)                       | 3.50  | 56.—  |

## Por la studo:

|                                             |      |      |
|---------------------------------------------|------|------|
| La Konsilanto (Degenkamp)                   | 3.60 | 54.— |
| Honderd vragen over grammatica en onderwijs | 0.75 | 11.— |
| Leidraad esperanto Literatuur (Degenkamp)   | 0.75 | 11.— |
| Esperanto in 20 lessen (Bakker)             | 3.—  | 50.— |
| Methodisch Leerboek (Dirksen)               | 1.50 | 24.— |

## Insignoj:

|                                                                                              |      |      |
|----------------------------------------------------------------------------------------------|------|------|
| Verda stelo kun blanka randeto, 15 mm                                                        | 0.75 | 13.— |
| Verda stelo sur blanka fono, 13 mm                                                           | 0.75 | 13.— |
| „8 mm                                                                                        | 0.65 | 10.— |
| Flaginsigno „Esp./Ned.                                                                       | 1.10 |      |
| La 8 mm-insigno Esp./Belga estas liverbla nur kun pinglo, la aliaj ankaŭ kun butono aŭ broĉo |      | 26.— |
| Bicikloflago                                                                                 | 0.75 | 10.— |

## Mendu ĉe:

Libro-Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam-O.  
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, Brugge.  
Belga Esperanto-Instituto, Oostenstraat 26, Antwerpen.

## Japana geografia lernolibro por infanoj

## kompilita helpe de Esperanto

En novembro 1953 la granda japana eldonejo Heibon-sya en Tokio komencis disdoni grandskale „El Japana Lando kaj Popolo“, en kiu libreto estis kolektitaj kelkaj verkaĵetoj de japanaj infanoj pri la ĉiutaga vivo en ilia lando. La verkoj estis elprenitaj el 8 japanlingvaj volumoj pri Japanujo, jam eldonitaj de Heibon-sya kaj tute bazitaj sur la kunlaboro de lernejoj infanoj inter la aĝoj de ĝis 17 jaroj.

„Oni opinias ke en la verkoj de infanoj la dum kaj postmilita japana socio estas reale kaj vive respegulata“. (Vidu ankaŭ artikolon de Violet C. Nixon en Esperanto, jan. 1955).

Post la eldono de la prijapanaj volumoj oni projektis eldonon de similaj pri la tuta mondo. Same kiel okazis en Japanujo oni deziris konigi la ĉiutagan vivon en ĉiu lando pere de priskriboj verkitaj de la infanoj mem.

Oni petis Esperantistojn en divers-

aj landoj traduki esperantlingven verkaĵojn de infanoj pri iliaj landoj, urboj, vilaĝoj, la ĉiutaga agado kaj farado, la laboro de la gepatroj, pri ludoj, lernejoj, k.t.p. En Tokio oni tradukis ree japanlingven tiujn esperantajn tekstojn. Kolektinte ĉiujn taŭgajn verkaĵojn, ilustritajn de fotoj, grafikoj kaj antaŭ ĉio de infandeseĝnaĵoj, oni akiris belegan, unikajn geografiajn lernolibron por infanoj. Kiu ja povas pli bone verki por infanoj ol infanoj mem?

Ankaŭ en ne-esperantistaj rondoj la projekto vekis intereson. En la monata revuo „Vernieuwing van Onderwijs en Opvoeding“ de nov. 1954 Sino S. J. C. Freudenthal-Lutter dediĉis artikolon al tiu ĉi entrepreno. Kaj nun kuŝas antaŭ mi la rezulto de la laboro en Okcident-kaj Orient-Germanujo, Nederlando, Belgujo, Svisujo kaj Aŭstrujo. La japana eldonejo afable sendis al mi kiel kunlaborinto ekzempleron, belegan libron, kiu multe superas miajn atendojn. Tia lernolibro ne troviĝas en nia lando. Aŭ eble, oni ne povas diri „lernolibro“, ĉar plej grava ĉi tie estas la senpera kontakto de infano kun in-

## Multan Dankon

(Okaze de la 4a Internacia Ferio Esperanto Semajno en Krommenie).

1. Du angloj iris al la Zaan  
Por partopreni en feri'  
Dupleksa karavano  
Dro Osborne kaj mi!
2. Inter alilandaj anoj  
Kvindek francoj kun Delaire (\*)  
Svedo, finoj kaj germanoj,  
Kaj italoj... jen la ver'
3. Enirinte urbodomon  
De vilaĝo Krommenie (\*\*)  
Oni festis ĉiun homon  
Per akcepta ceremoni.
4. Tie oni trinkis kafon  
Mangis kukon kun plezur'  
Poste havis fotografin  
Kaj foriris per vetur'.
5. Dum la tuj sekvantaj tagoj  
Oni gaje distris sin,  
Muelejoj, maro, lagoj,  
Kaj ĉie pontoj... jes sen fin'.
6. Tro rapide preterpasis  
Ĉiutagaj programeroj  
Malfeliĉe ni forlasis  
Adiaŭen al polderoj. (\*\*\*)
7. Fine en la festvespero  
Ni distigis, ho! malĝoje,  
Tamen restas la espero,  
Ni renkontu alfoje!
8. Gastoj nun el plena koro  
Pro feliĉo, ĝuo, bel'  
Volas diri, eĉ kun ploro,  
„Krommenieers dank U wel“. (\*\*\*\*)

Notoj: \* S-ro P. delaire el Orleans.  
\*\* Kelkajn kilometrojn norde de Amsterdamo.  
\*\*\* Antaŭa maro, nun terpecoj.  
\*\*\*\* Krommenie-anoj, Multan dankon.

F. Douglas Murphy.

fano tiel ke la ideo de „lernado“ tute forestas.

Ĉar kompreneble la teksto estas japana, ni bedaŭrinde ne povas ekkonni la skribitan enhavon, krom kelke da fragmentoj de represitaj leteroj, i.a. esperantlingva letero pri Kristnasko.

Tamen ni povas akiri ideon pri la enhavo rigardante la multajn ilustraĵojn kaj landkartojn. Tiel en la parto de Nederlando ne mankas la fotoj de ventmueliloj kaj floruulbarkampoj, sed ankaŭ troviĝas ilustraĵoj pri la inundo de Wieringermeer, riparo de diĝoj, pri havenoj, ludantaj infanoj rikoltado de fojno en Marken kaj multaj aliaj. Krome infandeseĝnaĵoj i.a. de farmdomo, de parko kaj de neĝpupo. Ankaŭ tre instruaj estas la landkartoj, i.a. karto kiu montras la submarnivelajn partojn de nia lando.

Tiu libro estas modelo de instrua

daŭrigo sur p. 3

## Eindhoven La Urbo de l'Estonto

En la jaro 1232, kiam Eindhoven estis nur eta kolonio ĉe la kunfluo de la riveroj Dommel kaj Gender, ĝi ricevis „urboraĵojn“ de duko Hendriko la unua. Depost ĉi tiu jaro ĝia evoluo komenciĝis sed estis ripetfoje malhelpata kaj ĝenata de detruemaj armeestroj kaj rabemaj soldatoj.

Kun admirinda elasteca forto la mezepoka Eindhoven tamen ĉiuforte sukcesis releviĝi kaj regajni sian antaŭan prosperon, kio precipe okazis depost la jaro 1813 post la foriro de la francaj trupoj. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj la komerco kaj industrio konstante malfaldiĝis kaj ĉe la fino de la antaŭa jarcento bazo estis fondita por multflanka industria karaktero de la urbo. Ĝiaj persistero kaj rekonstruemo neŝancelble restadis ĝis hodiaŭ kaj denove ĝi instigas ankaŭ la nunajn Eindhoven-anojn al energia rekonstruado de ilia urbo, montrante ankoraŭ nur kelkajn signojn de la teruraj bombardadoj el la lasta mondmilito. Oni energie laboradas por efektiviĝi la multpromesan rekon-

struplanon, kiu ne nur celas radikalan ŝanĝon de la urbocentro, sed ankaŭ starigon de tute novaj loĝejukvartaloj.

Miriga kaj senkompara estas la nebrideble forta kreskado de la iama urbeto en la Kempenlando depost la jaro 1891, en kiu Philips fondis sian etan entreprenon kun nur 30 laboristoj. En 60 jaroj la industria etulo elkreskis ĝis industria giganto, kiu nun havas siajn proprajn organizojn kaj fabrikojn en preskaŭ 50 landoj tra la tuta mondo kaj kies centra industrio estas en Eindhoven; kie pli ol 30.000 gelaboristoj okupas sin pri la produktado de miloj da diversaj produktoj; kie pli ol 500 inĝenieroj kun iliaj asistantoj okupas sin en plej modernaj laboratorioj pri la perfektigo de la produktoj; kie 32 kuracistoj kaj pli ol cent geflegistoj, geadministrantoj kaj gehelpantoj okupas sin pri la sanstato de la glaboristoj; kie pluraj centoj havas sian okupon pri la loĝado, kultura kaj socia zorgoj, sporto, distriĝo, en la lernejoj, k.t.p. Ne mirige estas, ke Philips tre grave influis ne nur la eksteran karakteron de la urbo, sed ankaŭ ĝian socian kaj ekonomian staton.

Tamen malgraŭ la amasa enmigrado de ne-Brabantanoj, allogitaj de la kvazaŭ Amerikeca elkresko de sia industrio, Eindhoven restis tipe Brabant urbo, kiu daŭrigis siajn religiajn kaj sociajn tradiciojn. La leviĝantaj turoj de la dekana preĝejo S-ta Catharina, kaj la multnombro da aliaj preĝejoj same formas simbolon de ĉi tiu sin levanta urbo, kiel la multaj fabriktuboj, kiuj karakterizas la urbopanoramon. La enloĝantaro de Eindhoven same alte taksas la genicon de la fizikaj kaj teknikaj laboratorioj, kiu ebligas materialan prosperon de la urbo, kiel la senripozan penadon por saniga, mensa kaj eduka vivado. La mezepoka, sed juna vivo-forta Eindhoven, portas en si la promeson utiligi sian industrian evoluadon al la mensa kaj materia prospero de siaj 160.000 enloĝantoj.

Por la turisto Eindhoven kaj ĝia ĉirkaŭaĵo prezentas grandan trezoron de vidindaĵoj: la S-ta Catharina-preĝejo, finkonstruita en 1867; la monaĥejo „Mariënhege“ el 1419; la malnova turo el la 15-a jarcento; la urba Van Abbe-muzeo, en kiu oni regule ekspozicias ĉiajn artaĵojn kaj pentraĵojn, precipe modernajn; la Philips-fabrikkompleksoj; la nova 18 septembro-placo kun la nova, moderna stacidomo kaj la statuo de d-ro Anton Philips; la Radio-monumento; la vespera iluminado, k.t.p. formas allogan vidindaĵon. Por la distriĝo Eindhoven prezentas varian elekton da teatraĵoj, muziko, filmoj, k.t.p. en sep teatroj;

## U.N.E.S.C.O. - Novajoj

AKCIDENTOJ KAJ LA PUBLIKA SANO

Statistikoj pri mortigaj akcidentoj montras, ke ili plioftiĝis dum la lastaj jaroj, pro du kaŭzoj: unue, okazis ŝajna plimultiĝo ĉar malpliigis la mortoj pro infektaj malsanoj, kaj due, reala plimultiĝo rezultigis de novaj danĝeroj pro la antaŭenigo meĥanika kaj teknika.

Diskutante la malhelpon de akcidentoj kiel parton de la laboroj por la publika sano, la Monda San-Organizaĵo (Eŭropa Regiona Komitato) lasta tempe substrekiis la gravecon de la edukado de infanoj, por doni al ili senton de respondeco pri sia sanstato. En multaj industriaj landoj, oni asertis, akcidentoj en kaj ĉirkaŭ la domo kaŭzas pli multajn mortojn ol akcidentoj sur la stratoj aŭ en la laborejo. En la Unuiĝinta Reĝlando, ekzemple, el meze 45 mortigaj akcidentoj ĉiutage, 24 okazas en kaj ĉirkaŭ la domo, 16 dum vojaĝado, kaj 5 en la laborejo. En Germanujo, akcidentoj en la hejmo ampleksas pli ol 30 % de ĉiuj akcidentaj mortoj, kaj rapide industriigo de Jugoslavio kaŭzis seriozan plimultiĝon de akcidentoj.

NEDERLANDO ALIGAS AL LA INTERKONSENTO „LIBERA FLUO“ DE UNESKO

Nederlando estas la dudek tria lando aplikanta la UNESKO-interkonsenton, kiu liberigas de imposto librojn, gazetojn, revuojn, artverkojn, muzikaĵojn, edukajn filmojn kaj diskojn, kaj kelkajn kategoriojn de scienca ekipaĵo.

La aliaj dudek du landoj, kiuj aplikas la interkonsenton, estas: Belgujo, Kambodio, Ĉeĵono, Kubo, Egiptujo, Finnlando, Francujo, Grekujo, Haitio, Israellando, Laoso, Monako, Pakistano, Filipinoj, Salvadoro, Hispanujo, Svedujo, Svislando, Tajlando, Unuiĝinta Reĝlando, Vjetnamo kaj Jugoslavio.

Krom liberigi materialon de dogan-impostoj, la registaroj laŭ la interkonsento donas import-permeson kaj valut-interŝanĝon por eldonaĵoj, kiujn bezonas publikaj bibliotekoj. Internaj impostoj sur la importitaj materialoj devas ne esti pli altaj ol tiuj sur internaj produktaĵoj.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo.)

sennombrajn ejojn por sporto, nagaĉo, ludado; zoologian gardenon „Animali“; belegajn parkojn k.t.p. Precipe la variado de la Brabant, pura naturbela, sovaĝe romantika, formas turistatan paradizon.

Eindhoven estas preta akcepti vin!!!





1957

Estimataj gelegantoj, jen ni staras denove antaŭ la disvolvigo de nova jaro, kaj ni ĉiuj jam estas scivolaj pri tio kion ĝi por nia movado alportos. Ni ĉiuj havas niajn atendojn, sopirojn kaj esperojn sed kiom da ili en la venonta jaro plenumiĝos, ni ne povas antaŭvidi. Pli facile estas de la sojlo de la nova jaro ĵeti rigardon returne en la pasintan jaron por superrigardi kion la jaro 1956 portis al nia movado en la tuta mondo kaj en nia lando speciale.

Nu, se ni estas bone informitaj ni devas konstati ke la forpasinta jaro por nia movado en tute kaj speciale por ĝi en nia lando ne estis tiel favora kiel oni povus deziri. Grandaj manifestacioj ne okazis, la alfluo de kursanoj estis ĝenerale tre malgranda kaj do ne mirige ke la nombro de membroj tute ne aŭ nur malmulte kreskis por ne diri ke ĝi malkreskis. Nia afero en la Eŭropa Konsilantaro ĝis nun fiaskis. La Lingva Kongreso en Arnhemo ne donis multajn rezultatojn. En multaj lokoj nia afero stagnis kaj tiel ni povus daŭrigi. Kompreneble oni demandas al si, kio povas esti la kaŭzo de tia situacio. Nu, sincere dirite, ni opinias ke en multaj asocioj la gvidantaro fariĝas tro maljuna. Se oni ne perdis la idealismon por nia afero ili tamen perdis la necesan energion por daŭrigi la laboron tiel entuziasme kaj persiste kiel ili faris tion antaŭ dudek aŭ tridek jaroj. Certe estas ankaŭ kialoj, kiuj kuŝas sur la socia kaj ekonomia terenoj sed ilin oni povus venki se nur estus sufiĉe da entuziasmo. Ĉu la jaro 1957 alportos ŝanĝojn en tia situacio? Ni, ne scias, sed forte esperas tion. Laŭ nia opinio ni devas ankoraŭ pli multe contentigri niajn klopodojn al la ĵurnalaro kaj do al la lernejoj. Tial estas necese trovi la plej bonan vojon por atingi la ĝeinstruistojn kaj pere de ili la ĝelernantojn. F. W.

## „Nuntempa Bulgario“

De la 1<sup>de</sup> januaro 1957 en Sofio komencos aperi granda monata revuo „Nuntempa Bulgario.“

Ĉiu kajero ampleksos 32 paĝojn kaj havos kovrilojn. La revuo estos redaktata nur en Esperanto. Ĝi estos riĉe ilustrita kaj presata sur luksa papero, formato 21 x 26 cm.

„Nuntempa Bulgario“ ne estos politika revuo. Ĝi enhavos materialojn pri la bulgara lando kaj popolo, pri ĝiaj kulturo, arto, literaturo. Ĉiu kajero enhavos rakonton, sportrubrikon, filatelian angulon, multajn karikaturojn. Krome, la revuo publikigos Esperanto-novajojn pri la en- kaj ek-

## LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

### Antverpeno

- In 't Duifken** (S-ano Paesmans), Lgè Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)  
**Vino Max Bolsius**, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85  
**M. Philips**, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.  
**P. van der Hoydonck-van den Buys**, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.  
 ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86  
**J. Montmirail**, Kortemarktstraat 53, Berchem. Arĥitekto. Tel. 39.58.66  
**Morris de Ketelaere**, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09  
**S-ino Henny Jacques-de Ketelaere**, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38  
**Roger Jaumotte**, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14  
**K. Amerijckx**, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07  
**R. De Soete-Vanistendael**, Dambruggestraat 234, Antv. Okulvitroj — Rab. 5 0/0  
**CL. Peeters**, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67  
**Firmo van Iseghem & Verstraeten**, St. Bernardse steenweg 631, Hoboken.  
 Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20  
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81  
**H. Peeters**, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47  
**H. Jacques**, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38  
**Verdijck**, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07  
**P. Peelman**, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55  
**Y. Ameryckx**, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj  
**M. Blajwas**, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18  
**A. van den Neste**, Deurnebaan 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

### Brugo

- Marcel Poupeye**, Elf Julistr. 32. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93  
**Charcuterie Strovi**, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08  
**Maison Joye**, Gelmontstr. 29. Ĉemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75  
**Firmo G. Verbeke**, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵoj: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85  
**Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL**, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

### Bruselo

- Farmaciisto Jacobs**, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01  
**Farmaciisto N. Nelis**, Meise 59.13.73  
**„BONBONS SWINNE“**, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36  
**Imprimerie Lielens**, 18, rue de la Princesse 21.10.98  
**CARRELAGE „Carrart“**, 19, avenue de Saxe 21.74.49  
**Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn**, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97  
**Libroj, Publikadoj, ĵurnaloj**, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03  
**Tinkturejo, senmakuligejo „TEX“** 11, Av. du Couronnement,  
 Woluwe St. Lambert 70.75.82

**KOMERCISTOJ** kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamoj en siaj butikoj

- G. Baeten**, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj  
**„De Boerinekens“** (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo  
**A. Roels**, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07  
**G. Goemaere**, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktejo  
**Vandersmissen**, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj  
**Van Kerckhoven**, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj  
**R. Scheerdijk**, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Ŝnuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj ĝardenilaro  
**Butiko Angora**, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj  
**Librejo Schuttershof**, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj  
**Vojaĝ-agentejo Pier Busseti**, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

### Anonco

S-ro Kazimierz Badowski, L.S.C., — Konarskiego 52 m 9 — KRAKOW (Pollando) deziras ricevi el ĉiuj landoj la plej lastajn ilustritajn fabrik-katalogojn de trikfabrikadoj (ĉefe tiuj faritaj per „Elastic“-maŝinoj), nome: viraj, virinaj, infanoj (precipe suĉinfanoj) subvestoj kaj vestoj. Mi volonte rekompensas la kostojn al la sendintoj laŭ ilia deziro kaj premios la plej belajn el la senditaj katalog-kolektoj per valoroj kaj luksaj Pollandaj esperanteldonaĵoj.

sterlanda movadoj, leterojn de esperantistoj, recenzojn, anoncetojn pri korespondado.

La abonkotizo por unu jaro (12 kajeroj) estas nur, 4 ned. guld., 50 belgaj frankoj.

La unike bela „NUNTEMPA BULGARIO“ estos vera perlo de la Esperanto-gazetaro. Ĝia malalta prezo ebligas al ĉiu samideano aboni ĝin!

Abonoj peras:

BELGA ESP.-INSTITUTO

Oostenstraat 26, Antverpeno